IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 52 - trimonata
2022/2

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Daniele Binaghi
Enrico Borrello
Laura Brazzabeni
Renato Corsetti
Gong Xiaofeng (Arko)
Marija Jerković
Kóródy Zsófia
Stefan MacGill
Alessandra Madella
Luigia Oberrauch Madella
Rob Moerbeek
Joel Muhire
Németh József
Fernando Pita
A. Giridhar Rao
Ahmad Reza Mamduhi
Spomenka Štimec



ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
A. Giridhar RAO: *Lingva enketo kiel enkonduko al lingvaj rajtoj* 4
Renato CORSETTI: *En la mondon venis nova sento* […] 7
Stefan MACGILL: *ILEI elstaras multrilate, sed kien plu?* 8
La sperto kolekti, resumi kaj disponigi interrete la italajn diplomlaboraĵojn kaj disertaciojn pri E-o (A. MADELLA, E. BORRELLO, D. BINAGHI)..... 11
Alessandra MADELLA: *Intervjuo al Joel Muhire*..... 14
El la landoj kaj sekcioj (CN, DE, HU, KR, IT, LU, RU) 16
Rob MOERBEEK: *Ripeti por enkapigi* 27
Pri „Hodler en Mostar (Intervjuo de A. Madella kun Spomenka Štimec) 31
Kongresaj kaj simpoziaj informoj (Laura BRAZZABENI, Fernando PITA).. 34
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj 37

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, Estr. Cel. Vieira 134, bl 3, ap 402; Irajá; Rio-de-Ĵanejro cep 21220-310, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram,WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]
***Membroj*:**
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah
Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]
Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu
Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: Ni kongresos en Kebekurbo (*vd. p. 34*)

Sur la dorskovrilo: projekto VERDEN (supre), italaj esperantistoj el Parmo (malsupre) (*vd. p. 20*)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Dum mia jam longa esperantisteco, vidante ĉian malsaton, malriĉon, maljuston, diskriminacion kaj neegalecon en la mondo, mi ĉiam konsolis min, ke ĉio, kion mi/ni faras por la disvastigado de Esperanto, estas kontribua paŝo por forigado de tiuj malbonaĵoj.

Jardekojn antaŭe, leginte kelkajn biografiojn de Zamenhof por komplili koncizan prezenton de lia vivo por mia libro, mi konkludis, ke la komenciĝo de la unua mondmilito probable estis la ĉefa kaŭzo por lia tiel frua morto – se mi estus Zamenhof, nun pasus kvar jaroj de mia morto!

Precipe en la nuna tempo estas tre facile por ni ĉiuj imagi kian frustriĝon li travivis kiam li ekfrontis tia-skalan mondmiliton ĝuste post tiom longaj klopodadoj por garantii tutmondajn pacon kaj amikecon per la kunliga lingvo Esperanto.

Nia Ligo okupiĝas pri instruado, kaj instruado estas la ĉefa piliero de edukado, kiu siavice laŭ la fama diro de Nelson Mandela estas „La plej potenca armilo por plibonigi la mondon".

Ĉar ĉiuj niaj registaranoj estas elektitaj el inter ni mem, do, se ni ĉiuj estas pacame edukitaj, neniu milito plu okazos.

Ahmad Reza MAMDUHI

Lingva enketo kiel enkonduko al lingvaj rajtoj

A. Giridhar RAO (rao.giridhar@apu.edu.in)
Universitato Azim Premji, Bengaluro, Barato



En Universitato Azim Premji [premĝi] A. Giridhar RAO gvidas kursojn kaj verkas esplorstudojn pri multlingva edukado, lingva pedagogio kaj strategiaro. Li foje blogas ĉe https://lingvovivo.blogspot.com/

Tiu ĉi mallonga noto priskribas etan lingvan enketon, kiun ni faris en marto 2022 en Universitato Azim Premji en Bengaluro, Barato. Unue iom pri la universitato kaj ĝiaj studentaro kaj kursaro, poste la rezultojn de la enketo mem, kaj ni finos per diskuto de la rezultoj.


Universitato Azim Premji (laŭ la anglalingva mallongigo: APU) estas nekutima institucio en la pejzaĝo de supera edukado en Barato: privata, sed ne profitcela universitato kun eksplicita socia celo, nome kontribui al la kreado de pli justa, egaleca, daŭripova kaj homeca socio. Ni sufiĉe amplekse priskribis la universitaton aliloke, kaj ne ripetos la detalojn ĉi tie (Rao, 2020a). Sufiĉas por niaj celoj ĉi tie noti, ke pro la celo de APU prepari profesiulojn por la socia sektoro, la studentaro estas el nekutime diversaj fonoj. Jen la studenta profilo de la studentaro de 2021:

- 51% el la studentoj estis el kampara Barato aŭ el urbetoj
- studentoj venis el 25 de la 28 barataj gubernioj
- 57% estis virinoj
- 60% ricevis financan subtenon de la universitato
- 17% de la magistraj studentoj havis du jarojn aŭ pli da laborsperto, kaj 31% havis iom da laborsperto.

La studentoj estas aparte sentemaj pri argumentoj pri diskriminacio, ekskludigo, egaleco, rajtoj kaj strategiaro. Sed pri lingvaj neegalecoj, komence de la kurso, la ĉefa konstato estas nur, ke la angla estas lingvo de privilegio kaj diskriminacio. Estas ĝenerale malpli da scio pri la dinamiko inter aliaj lingvoj de la lando kaj pri lingvo kiel io, kio respegulas, formas, kaj reproduktas privilegion, diskriminacion kaj ekskludigon. Jen la fono de la lingva enketo.

Ni faris la lingvan enketon en kurso titolita „Enkonduko al Lingvo kaj Literaturo en Edukado”. La 16-semajna kurso estas deviga dum la dua semestro de kvar-semestra magistra kurso pri edukado. La enketon ni faris jam dum la dua klaso de la kurso. La celo de tiu studbloko estas esplori aŭtobiografie la lingvajn malsimplecojn de la kursanoj. Ni faris la enketon sen multe da preparo por kapti la spontanecon de la respondantoj.

La 20 homoj en la ĉambro estis invititaj „listigi la lingvojn en la klasĉambro”. Simple tion. Jen la listo de 31 lingvonomoj!



Mallongigoj: 1. La angla, 2. hindia, 3. tamila, 4. telugua, 5. maratha, 6. kannada, 7. malajala, 8. odia, 14. panĝaba, 15. franca, 16. sanskrito, 17. bengala, 18. hispana, 19. guĝarata, 20. urdua, 27. Esperanto.

Diskuto

Ĉar la instrulingvo de la universitato estas la angla, ĝi aperis je la unua loko. La klasanoj rapide listigis plurajn el la 22 aliaj „oficialaj lingvoj” de Barato. Kaj tuj poste ekaperis la nuancoj.

- „Mi komprenas la panĝaban, sed povas nek legi nek skribi ĝin. Ĉu mi rajtas mencii ĝin?”
- „Hejme ni parolas la harjanan. Sed ĝi estas nur dialekto de la hindia, ĉu ne? Ĉu mi tamen rajtas inkluzivigi ĝin?”
- „Kio pri la sanskrito? Ĉu mi nomu ĝin unu el miaj lingvoj?”
- „Mi faris unu jaron da franca en la lernejo. Ĉu mencieblas?”
- „Fakte, la gepatra lingvo mia estas la indiĝena lingvo *Lambani*. Ĉu mi rajtas?”

Kiel la supraj kvin reagoj indikas, sufiĉe rapide leviĝis tiklaj demandoj. Sed antaŭ ol diskuti tiujn, ni tuj notu, ke aperis en la listigo unue la grandaj „oficialaj” lingvoj. Poste la „dialektoj” (10. *Bundelkhandi*). Indiĝenaj lingvoj estis menciitaj laste (24. la santala; 30. *Lambani*). La klasanoj ekkomprenas, ke troviĝas lingva hierarkio jam en la ago de la listigo! En posta klaso ni estis diskutontaj la sociohistoriajn fontojn de neegalecoj de potenco inter lingvoj (tial la angla vorto *Hegemony* [hegemonio] sur la tabulo).

Pro la klarigpetaj demandoj ni malpakis unue la pretendon „koni lingvon”. Ni tiel preparas la grundon por diskuto en posta klaso de la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj. Due, montriĝis la arbitra distingo inter „lingvo” kaj „dialekto”. La lingvo-edukaj sekvoj de tiu distingo estas profundaj: parolantoj de la malaltprestiĝaj variaĵoj estas ofte diskriminaciataj. Ni baldaŭ estis diskutontaj la fenomenon de lingvovariaĵo, kaj venos al la fama diraĵo, „lingvo estas dialekto kun armeo kaj mararmeo”. Tial sur la tabulo aperas la substrekitaj hindiaj vortoj *bhasha* (t. e. „lingvo”) kaj *boli* („dialekto”). Trie, la tristiga pozicio de indiĝenaj lingvoj en tiu lingva ekologio. La fakto, ke ili estas menciitaj laste – kaj eĉ tiam heziteme – spegulas la oftan sperton en la lerneja sistemo (tutmonde!), ke oni apenaŭ konsentas nomi ilin eĉ „lingvoj”. Kune kun la mokemo de samlandanoj neindiĝenaj – anoj de la t. n. nacia ĉeffluo – pro ĉio ĉi, la klasanoj vidas, ke tiuj indiĝenaj lingvonomoj aperas laste.

En sekvaj klasoj dum la semestro ni diskutos lingvajn identecojn, homajn rajtojn, kaj la rajton je edukado – tial la nomo sur la tabulo de la esploristino kaj aktivulino Tove Skutnabb-Kangas, kies verkojn ni kune legos.

Lastatempe la barata registaro aperigis Nacian Edukstrategiaron 2020. La dokumento forte rekomendas gepatralingvan edukadon. Por pli detala diskuto pri tiu dokumento, vidu la artikolon „Plurlingva edukado en Barato: taskoj kaj defioj” (IPR 20/4, pĝ. 23-27; Rao, 2020b). Nia lingva enketo nuancas la rekomendojn de tiu edukstrategiaro. Oni kapablas nun malpaki la ŝajne memevidentan kategorion „gepatra lingvo”.

Fine de la studbloko, studentoj verkos (en la angla) 2000-vortan „lingvan aŭtobiografion” – eseon pri la lingva ekologio de la propra vivo. La lingva enketo ebligos al ili diskuti pli nuance ne nur la rolon de la angla en sia vivo, sed ankaŭ la interrilatojn de la aliaj lingvoj en la propra medio. Espereble, la eseoj montros la intimajn ligojn inter lingvo kaj identeco.

Tiel la lingva enketo respondas al unu el la celoj de la kurso, „Analizi lingvan diversecon, lingvan variaĵon kaj hierarkiojn en la socio, kaj kompreni la implicojn por la multlingvaj barataj klasĉambroj.”

Referencoj

Rao, A. G. 2020a. Lingvaj homaj rajtoj kaj multlingva edukado: raporto de barata universitato. *Decolonial Subversions*. http://decolonialsubversions.org/docs/pdfs/7_2020.04.04_AGRao_Esperanto.pdf & https://www.academia.edu/43373126/Lingvaj_homaj_rajtoj_kaj_multlingva_edukado_raporto_de_barata_universitato

Rao, A. G. 2020b. Plurlingva edukado en Barato: taskoj kaj defioj. *IPR.* 2020/4. Pĝ: 23-27. https://www.ilei.info/pdf/IPR2020_4_PRINT_jdggduzew.pdf

En la mondon venis nova sento: ni komprenis, ke nia ĉefa tasko en ILEI estas instruado de Esperanto

de Renato CORSETTI (Italio)

Dum unu el la pasintaj vendredoj estis la unua de aprilo, tago, kiu en multaj landoj estas tago de ŝercoj kaj trompoj, sed en la 9-a Reta Forumo de ILEI, kiu okazis la unuan de la pasinta aprilo, estis nek ŝercoj nek trompoj. Oni eĉ reiris al la statuto kaj diskutis pri la kerna tasko de ILEI.
Kompreneble la statuto en sia artikolo kvara klare diras tion, kion ni devas fari:
„*4.1. Unuigi instruistojn kaj instruantojn esperantistajn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn kaj por celtaŭga instruado de Esperanto.*"

Sekvis granda diskuto, ĉar instruistoj kaj instruantoj de Esperanto ŝatas longe paroli por montri sian *-n* de la akuzativo eĉ en improvizitaj paroladoj, sed la konkludo estis simpla: ĉiuj organoj de ILEI havas tiun taskon kaj estu pritaksataj surbaze de la praktikaj rezultoj de tiu tasko, alivorte iu, kiu instruas Esperanton en publika lernejo al 20 infanoj, estas pli merita ol iu, kiu tradukas pedagogigajn/pedagogiajn tekstojn el la mezepoka aramea aŭ verkas romanojn, kiuj gajnas premiojn en universalaj konkursoj. Ni celas instrui Esperanton. Punkto.

Do, ILEI ĉefe strebu por enkondukado kaj instruado de Esperanto en ĉiuspeca lernejo de infan-ĝardeno ĝis doktorigaj kursoj kaj ankaŭ en la strukturojn de la Esperanto-movado.
Samtempe oni diskutis pri la stato de la sekcioj kaj pri la neceso malpliigi la administrajn taskojn kaj pliigi la instruajn taskojn. Por helpi al la sekcioj oni donis i.a. jenajn proponojn:

1. Se iu sekciestro deziras/bezonas, ILEI senpage membrigu tiun – sed por eviti troan ekonomian premon al ILEI, tiakaze membroj ricevu nur la retan/ciferecan version de IPR (kaj JA?).
2. ILEI en sia (futura) retejo disponigu apartan paĝon al ĉiu sekcio, por pli facile alirebligi la sekciojn por ĉiuj.

Inter aliaj pli ĝeneralaj proponoj, estis:

- Senpaga membrigo de ĉiu, kiu ajn ne povas (trans)pagi la kotizon. Denove por eviti troan ekonomian premon al ILEI, ankaŭ tiaj membroj ricevu nur la retan/ciferecan version de IPR (kaj JA?).

- Difinado aŭ estigado de ununura oficiala reta komunikad-kanalo por ILEI, en kiu ĉiuj – eĉ nemembroj – povu kundividi siajn komentojn, ideojn k.s. rilate al ILEI.

Fina sed ne fona diskuto temis pri la bezono en ĉiuj landoj de retaj kursoj de Esperanto. La pandemio instruis al ni, ke tio estas ebla, kaj nia prezidanto Ahmad Mamduhi donis al ni la ekzemplon per fondo de la projekto Esperanto-Kursaro Tibor Sekelj (*https://www.espero.ir/eo/kursaro/*), kiu subtenate de la Irana Esperanto-Asocio senpage disponigas Zoom-rimedojn al ĉiuj, kiuj volas prezenti kaj/aŭ instrui Esperanton rete al siaj samlingvanoj, kaj kiu efektive okazigis/as kursojn por afrikanoj kaj azianoj en pluraj lingvoj. Nun estas la vico de la landaj sekcioj kaj/aŭ aktivuloj komenci fari la samon. La tre malgranda sekcio en Serbujo kun nia Radojica Petroviĉ jam faras tion, kaj nia plej aktiva ĉina sekcio faras tion de jaroj per misteraj ĉinaj retaj iloj. Ni imitu ilin ĉie.

Nerespondita restis la ĉefa demando de la kunordiganto de la franca sekcio: kiel altiri junajn instruistojn al ILEI? Tio estas demando tro malfacila, sed eble al ĝi kaj al la alia esenca demando – t.e. retrovi la fokuson de nia agado pri instruado de Esperanto – respondos la laborplano starigota de la nova estraro: laborplano, kiu konsideru la tutan ILEI-aktivularon kaj ne nur kelkajn elstarajn heroojn.

ILEI – la nova pioniro – nur rekonu tion!

ILEI elstaras multrilate, sed kien plu?

de Stefan MACGILL (Hungario)

Nia instruista sekcio suferas kelkajn kritikojn. Tempo estas mezuri la atingojn kaj pripesi la bezonojn. El inter la aliĝintaj fakaj asocoj de UEA, ĝi klare prenas la elstaran rolon kaj vere meritas sian lokon esti partnero al UEA.

- ***Tri sinsekvaj agemaj kaj heroaj prezidantoj:***

Ahmad Mamduhi: Havas universitatnivelajn kapablojn. Enprenas novan kulturon, prizorgas la plej aktivan estraron de ILEI en jaroj.
Mirejo Grosjean: Alportis egan elanon, havas vere tutmondan vidon, kun amaso da multlandaj kontaktoj, ankaŭ ĉe Unesko.
Stefan MacGill: Maldecus, ke mi blovu propran trumpeton, do vidu sube.

- ***La plej agema estrarano pri landa agado en jaroj.***

La nova Estrarano Marija Jerkoviĉ kontaktadis obstine kaj persiste multajn landojn por rekonstrui la reton de sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj. Tio grave necesas kaj mi komentas tion sube. La ĉefa atingo de la lastaj jaroj: la reaktivigo de la franca sekcio! Kiel respondeculo pri landa agado en UEA, SMG aktive kunlaboras kun ŝi.

- ***La plej agema estrarano pri reta komunikado en jaroj.***

La nova Estrarano Alessandra Madella faras mirindan laboron por prezenti la Ligon en retaj kanaloj kaj prizorgi kursojn. Ŝiaj retaj kapabloj valoras oron!

Strebu esti tutmonda, sed ne nepre laŭlanda

Mi ripetas por la umfa fojo (certe ne tri-umfa) mian proponon por raciigo de la sekcia funkciado. ILEI komprenu la realecon: la Ligo ne havas la forton prizorgi sekcion en ĉiu lando; ofte eĉ ne reprezentanton. Sed la Ligo iel kovru tiom el la mondo, kiom havas esperantistojn. ILEI havas la grandegan avantaĝon, ke ĝi allasas teritoriajn sekciojn, ne landajn. Venis jam la tempo pli plene ekspluati tion. Jen miaj proponoj:

Nordio: ILEI ne plu havas sekcion aŭ reprezentanton en Norvegio, Finnlando kaj Islando. Ĝi havas sekcion en Svedio kaj Danlando, sed ambaŭ nefortas. Al tiuj landoj aldonu la baltiajn ŝtatojn, el kiuj nur Litovio havas reprezentanton. La regiono bezonas unu heroon – momente ne klaras, kie troviĝus tiu homo. Tiu heroo povos ekprizorgi unu Nordian sekcion, kiu povos kunekzisti kun la nunaj funkciantaj sekcioj, sed doni servon al la ceteraj landoj.

Benelukso: ILEI tre bedaŭrinde perdis sian reprezentanton en Luksemburgo. Belgio havas sekcion, Nederlando havas solan heroon. Jam de la kvindekaj jaroj ekzistas la koncepto de ‘Benelukso’, tempo estas ke ankaŭ ILEI apliku tion.

Iberia sekcio: La portugala sekcio mortis antaŭ pluraj jaroj. La hispana funkcias, sed la kataluna ĵus malfondis sin. Nepre tempo por Iberia sekcio. Instruistoj el la aliaj multaj regionoj de Hispanio (Galegio, Eŭskio, Valencio k.a.) trovus alloga la ideon de iberia sekcio.

Amerika centra sudo: Temas pri Paragvajo, Bolivio kaj Urugvajo. Nepre la plej forta estas Urugvajo, kiu donis al ILEI brilan epokfaran kongreson en

2014. Sed temis pri unu-du aktivaj homoj. Alvenis kelkaj novaj lernintoj en Paragvajo, dank' al la brila hispanlingva kurso. ILEI nepre devus provi rikolti ion el tiu novularo. Pli fortaj apudaj landoj povus helpi pri la fondo de tia sekcio.

Aliaj ekzemploj aldoneblas! Tio ne estas regresoj, sed pritakso de la reala situacio kaj bezonas nur kelkajn kuraĝajn decidojn. Ĝi permesas redirektadon de niaj modestaj laborfortoj for de rutinaj administraj taskoj al produktiva laboro por krei kursojn kaj informi pli vaste pri la ligaj laboroj kaj servoj.

La rolo de SMG

Spite nur 4-jaran periodon en la prezidanteco de ILEI (2009-2013), jen:

- Signifa kreskigo de la liga retejo, kun la aktiva helpo de Jozefo Németh.
- Egaj aldonoj al la sekcio pri Historio (kun materialo el Finnlando pri la naskiĝo de ILEI), https://www.ilei.info/agado/historio.php
- 55 komitataj voĉdonoj de la Komitato (leciono por UEA), ĉefe por renovigi la bazajn regularojn de ILEI. https://www.ilei.info/dok/index.php?lingvo=eo
- Kongresoj 2010 en Kubo (Matanzas), 2011 en Kopenhago, la memorinda 2012 en Kunming (Ĉinio) kaj 2013 en Herzberg kun simpozioj en 2011 kaj 2012. https://www.ilei.info/agado/konferencoj.php
- Fondo de la nocio de 'partneroj' por egalecaj rilatoj kun aliaj edukaj instanco kaj starigo de prezento de tiuj partneroj en la liga retejo. https://www.ilei.info/instancoj/partneroj.php
- Aldono de biografiaj informoj pri 16 lastatempaj honoraj membroj. https://www.ilei.info/instancoj/honoraj_membroj.php
- Verkado de 14 gvidiloj, inkluzive de Gvidilo al la gvidiloj. https://www.ilei.info/dok/gvidiloj.php
- Kunlaboraj kontraktoj subskribitaj kun IFEF (2012) en Herzberg, renovigo de tiu kun UEA (2010). https://www.ilei.info/dok/kontraktoj.php
- Regula aperigo de buĝetoj tra la tuta periodo 2010-2013. https://www.ilei.info/dok/financoj.php
- Regula aperigo de kvin varbiloj en la retejo, el 2010, 2011 kaj 2012. https://www.ilei.info/dok/varbiloj.php
- Lanĉo de la simbolo de ILEI en 2010, ankaŭ uzata nun.

La valoro de kursoj

La nombro de kursoj pri Esperanto kreskas ege en la lasta jaro. Ni havas araban kurson, en Brazilo (EKO 2022-17), kun pluraj en Germanio kaj Italio. Kiel imageble, ILEI ludas grandegan kaj bele kreskan rolon. Ni devas agnoski la brilan laboron de la itala sekcio de ILEI kaj aliaj en la evoluigo de pliaj retkursoj. Sed kiel tiu kursosvarmo kontribuas al nia nuna temo, la refortigo de la sekcioj de ILEI?

Bedaŭrinde, la matematiko ne multe helpas nin. Ekzemple, el ĉ. ses mil kursanoj:

Du Mil tuj aŭ tre baldaŭ rezignas.
Dumilo plia plulernas sed ene de ses monatoj rezignas.
Milo plia efektive lernis la lingvon ĝis uzebloj kaj sporade vere uzas ĝin.
Kvincent sukcesis lerni kaj eĉ regule uzas ĝin kaj eniras la komunumon.
Cent lernis kaj uzas la lingvon kaj iumaniere eniras la movadon, sed ne ILEI.
Kvindek lernis kaj uzas la lingvon kaj eble ekmembros en ILEI.
Eble dek kvin fariĝas efektive aktivaj membroj ene de ILEI

Evidente, mi ne celas matematikan precizecon, sed vi kaptas mian mesaĝon. Ne imagu, ke ILEI tuj aŭ rapide prosperos pro la prizorgo de kursoj, kiom ajn grava kaj valora la kursa agado! La mesaĝo: kiam eble, kursoj devas enhavi informojn pri la rolo kaj projektoj kaj utilo de ILEI. Multaj kursanoj ja havos konekton kun edukado! ILEI devas intensigi siajn rilatojn kun eksteraj edukaj instancoj, por konigi la edukajn valorojn de nia lingvo!

La sperto kolekti, resumi kaj disponigi interrete la italajn diplomlaboraĵojn kaj disertaciojn pri EO[1]

de Alessandra MADELLA, Enrico BORRELLO, Daniele BINAGHI (Italio)

Nia komuna laboro temas pri serĉado, katalogado kaj disponebligado de diplomlaboraĵoj kaj disertacioj verkitaj en italaj universitatoj pri Esperanto aŭ rilate al Esperanto. La tuta ĝisdatigita listo, kiu ĝis nun enhavas la resumojn de 55 verkoj, elŝuteblas senpage el la paĝo „rimedoj" de la retejo de ESF (https://esfacademic.org/en/resources/). Ni praktike kaj konkrete parolos pri tio, kiel ni realigis tion, ĉar ĝi povas esti ekzemplo por homoj,

[1] Prelego dum la seminario de VEKI-2

kiuj volas fari la samon en sia lando. Ni ĉiuj serĉas diplomlaboraĵojn. Alessandra Madella verkas la resumojn. Enrico Borrello, kiu estas volontulo ĉe la Nacia Biblioteko de Massa kaj delonge serĉadis disertaciojn pri Esperanto el la tuta mondo, jam havis datumbazon kaj materialon en la biblioteko mem. Daniele Binaghi, la prizorganto de bitoteko.it, la cifereca biblioteko de Itala Esperanto-Federacio, disponebligas ĉion interrete. Danke al tiu ĉi videblo, multe da junuloj kontaktas lin, se ili estas verkantaj, verkontaj aŭ verkintaj diplomlaboraĵon pri Esperanto. Ĉe Bitoteko kaj ĉe Massa, studentoj trovas konsilojn kaj utilajn referencojn rilate al siaj esplortemoj. Ankaŭ danke al tio la nombro de diplomlaboraĵoj kreskas.

Alessandra Madella elektis verki argumentajn resumojn. En Usono oni multe fokusiĝas pri la ĉefa argumento de diplomlaboraĵo, ĉar oni pensas, ke legantoj devas tuj kompreni, pri kio temas. Male, laŭ la itala verkmaniero, studentoj pli ofte parolas pri siaj spertoj kaj motivoj aŭ pri sia kreskado dum la verkado mem. Sed trovi kaj substreki la ĉefajn argumentojn gravas, ĉar oni komprenas, kiel tiu laboraĵo kontribuas al pli granda debato kaj kiel argumentoj transformiĝas dum la tempo, transirante de unu fako al alia. Se la argumentoj de Esperanto povas transiri tra multe da fakoj, tio certe estas pruvo, ke ili estas fortaj.


En la tuta kolekto ĝis nun troviĝas nur unu disertacio en la nuntempa senco de „PhD". Tamen multe da laboraĵoj estis verkitaj antaŭ la Bolonja eŭropigo de la itala universitata sistemo en 1999 kaj kiam la titoloj „PhD" kaj „MA" en Italio ankoraŭ ne ekzistis. Per laboraĵo tiam oni rekte iĝis „doktoroj". Do, estas malfacile nomi tiujn malnovajn verkojn laŭ la nuntempa komuna divido inter diplomlaboraĵoj kaj disertacioj. Krome, en Italio ne estas multe da malsameco en difinoj de kvanto de paĝoj kaj kvalito inter bakalaŭraj kaj magistraj diplomlaboraĵoj. Ili dependas de la temo, de la laboremo kaj lerteco de la studento, kaj de la kapablo de la instruisto gvidi la esploradon. Sed oni ofte eĉ ne skribas sur la kovrilo, ĉu temas pri bakalaŭra aŭ magistra verko kaj oni devus kontakti la universitaton por ekscii tion. Krome, en la pasinteco oni multe pli gardis diplomlaboraĵojn en italaj universitatoj. Eĉ nun malnovaj verkoj pri Esperanto troveblas en la arkivoj de kelkaj universitataj bibliotekoj. Sed oni preskaŭ nur plu gardas disertaciojn pri sciencaj temoj. Pro tio gravas loko kiel la Nacia Biblioteko de Massa, kie la diplomlaboraĵoj kaj disertacioj pri Esperanto povas trovi hejmon por longa tempo, ĉar en universitatoj tio ne plu okazas. Se oni ne kaptas ilin, ili estos perditaj.

Bonŝance, Enrico Borrello jam delonge serĉadis diplomlaboraĵojn pri Esperanto kun la sama pasio, kiu pelas botanikiston serĉi specimenojn de floroj kaj aranĝi ilin en belan kolekton, ĉar laboraĵo pri Esperanto estas por esperantistoj kiel floro, kiu eliras el la neĝo. Ĝi estas bela en si mem, sed ĝi ankaŭ anoncas la belan sezonon kaj aliajn disvastiĝantajn florojn. Multe helpis lin en tiu serĉado la eksa prezidanto de la Eo-grupo de Massa, Alessandro Simonini, kiu ankaŭ finance kontribuis per la aĉeto de ekstera amasmemoro, kie la laboraĵoj estas konservitaj, aŭ per la presado de tiuj, kiujn oni enmetas en la bibliotekon. Se la laboraĵo ne estas libere elŝutebla el interreto, gravas kontakti la aŭtoron aŭ la universitaton, sed ne ĉiam eblas ricevi respondon. Konstrui datumbazon helpas por kontroli, ĉu novaj referencoj rilatas al jam akirita laboraĵo aŭ ne. La Nacia Biblioteko de Massa nun havas datumbazon de ĉirkaŭ 100 diplomlaboraĵoj rekte koncernantaj Esperanton kaj, krome, 44 laboraĵojn, en kiuj Esperanto estas nur menciita, iam eĉ negative. Kromaj dosieroj estas nun prilaborataj. Ankoraŭ eblas trovi referencojn pri laboraĵoj en bibliotekoj kaj Esperantaj retejoj; libro-kolektoj kaj Esperantaj kolektoj de landaj, fakaj aŭ lokaj esperantistaj organizoj; bibliotekoj aŭ tezo-kolektoj de universitatoj; bibliografioj de Esperantaj libroj aŭ de eseoj pri interlingvistiko kaj similaj temoj; vivpriskriboj de Esperanto-fakuloj; eseoj kaj artikoloj pri lingvistiko kaj artefaritaj lingvoj. Helpas ankaŭ Esperantaj revuoj el la tuta mondo. Tre riĉaj je fakaj fontoj estas *Informilo por Interlingvistoj*, eldonata de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), Fondaĵo pri Esperantaj Studoj (ESF) kaj *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) de ILEI.

En *Bitoteko.it*, la disertacioj troveblas, inter pli ol mil dokumentoj, en la kolekto nomata itale „Tesi di laurea e dissertazioni accademiche” (Sciencaj tezoj kaj disertacioj). Alklakante iun titolon, oni malfermas la dokumentan slipon kun ĉiuj detalaj informoj, inkluzive de priskribo, temo, aŭtoro, universitato, fako, paĝoj ktp. La substrekitaj informoj estas ligiloj al aliaj dokumentoj, kiuj havas similajn informojn. Ĉe la suba parto de la paĝo aperas rilataj eroj, kiuj povus esti interesaj por la serĉanto. Ĉe „dosieroj” estas senpage legebla, elŝutebla kaj printebla la tuta laboraĵo. Indas memori, ke ankaŭ ĉe la retejo de *Edukado.net* troviĝas bela kolekto de diplom-laboraĵoj. Tiuj internaciaj klopodoj plivalorigi laboraĵojn pri Esperanto estas tre gravaj, por montri, ke Esperanto estas studita, dissekciita kaj pribatalita dum pli ol unu jarcento, kvankam tiuj studoj ofte perdiĝis.

Intervjuo al Joel Muhire pri liaj kantoj, instruado kaj filma projekto

JM: *Joel Muhire*
AM: *Alessandra Madella*



***AM:** Ĉu vi povas diri ion pri vi mem?*
JM: Mia nomo estas Joel Muhire, el Rutshuru, oriente en Kongo-Kinŝaso (DR Kongo). Mi naskiĝis en 1989 en Ruanguba, kaj kreskis en familio de 12 membroj. Mia vivo ne estis facila, pro la malriĉeco de mia familio, kaj ankaŭ pro la ĉiutaga malsekureco. En mezlernejo mi studis pedagogion, sed mi ne povis universitatumi poste.

***AM:** Kiel vi eklernis Esperanton?*

JM: Mi eksciis pri Esperanto tute hazarde!

En marto 2008, miaj du pli aĝaj fratoj vizitis sinjoron Honoré Sebuhoro, unu el la unuaj esperantistoj de Rutshuru. Li interesis ilin eklerni Esperanton, lingvon pri kiu ili estis antaŭe neniam aŭdintaj (Esperanto estis tiam tute nova afero en Rutshuru). La interna ideo de Esperanto igis ilin decidi esperantistiĝi tuj. Reveninte hejmen ili informis la tutan familion pri la eltrovaĵo kaj ni miris! Vekis mian ŝaton alproprigi Esperanton la fakto, ke ĝi igas ĉiujn siajn praktikantojn amikoj, kvazaŭ-samfamiliaj fratoj, porpacaj batalantoj, … Miaj du fratoj kaj mi piediradis 10 km ir-revene de la urbeto Kiwanja al Rutshuru-Centro ĉiudimanĉe posttagmeze, eĉ kiam pluvis. Esperanto estis mirinde tre facila kaj esperdona! Mia ĝojo alte kreskis, kiam mi komencis korespondi kun eksterlandaj esperantistoj. Mi ne sciis, ke mi povus havi bonajn amikojn ekster Afriko. Ĝi vere malfermis al mi la pordojn al la mondo. Inter miaj unuaj kontaktoj mi citas kiel ekzemplon Renato Corsetti, kiu en 2010 faciligis mian membriĝon en UEA, pere de Fondaĵo Canuto.

***AM:** Ĉu vi instruas ĝin?*

JM: Mi estas pioniro de Esperanto en Kiwanja. Post kiam mi finlernis la kursaron de Hubert Ferez, mia instruisto donacis al mi kelkajn malnovajn numerojn de la revuo *Esperanto*. Ĉien, kien mi iris, mi kunportadis la revuon en la mano kaj penadis varbi novajn adeptojn por mia vespera kurso, tamen kun **ĉiam** vana klopodo. Tiam iuj homoj pensis, ke Esperanto estas la

hispana, aliaj pensis ke estas mia propra slango. Por informi la publikon je granda distanco, mi petis spacojn intermite ĉe la radioj RACOU FM, ALLIANCE FM, RACOVE FM; nuntempe mi elsendas instrucelan programeron duonhoran pri Esperanto ĉiumerkrede en la radio RTEDH FM kaj pagas libervolan kontribuon por la evoluigo de la radio. La 3-an de junio 2017 mi kreis la klubon Rondo Esperantista de Kiwanja (REK), kiu hodiaŭ havas ĉirkaŭ tridek membrojn. Mi enkondukis Esperanto-programon en 2014 en la bazlernejon Njiwa por orfoj, sed post la translokiĝo, la distanco ne plu permesas al mi frekventi la lernejon - mi serĉos aliajn eblojn. En 2018 en la landlima urbeto Bunagana mi starigis klubon, nome Bunagana-Esperanto-Amikaro kaj en 2021 kreis alian klubon en la vilaĝo Shanje, Suda Kivuo.

Verdire, Esperanto estas konata de multaj homoj en Rutshuru, sed tro malmultaj homoj sentas intereson pri ĝi.

AM: *Kiu estas via rolo en la Afrika Komisiono de UEA?*

JM: En la AK mi zorgas pri junulara agado kaj protokolado.

AM: *Kiel vi komencis kanti en Esperanto?*

JM: Mi sentis en mi la talenton kanti, sed mi ne havis instigon provi mian talenton en la loka lingvo, eĉ ne en la franca; sed kiam mi lernis Esperanton, mi trovis, ke ĝi estas la plej bona lingvo por fari muzikaĵon. Do mi decidis ekkanti en Esperanto por povi riĉigi ĝian kulturon kaj ankaŭ konigi Esperanton al lokaj neesperantistoj. Mi komponis mian unuan kanton „Esperanto, ponta lingvo" en 2012. La 2-an kanton „Al nia lingvo, poemo de Julio Baghy", mi komponis estante rifuĝinto en Rwamwanja, Ugando, en 2013, post la M23-milito. Mi publikigis en 2017 mian unuan albumon kun 10 kantoj sub la titolo: *Esperanta ilo de paco* (laŭ la temo de la 6-a afrika kongreso, kiu okazis en Bunda, Tanzanio en 2016). Mi jam faris koncertojn en kelkaj afrikaj landoj: en Togolando, en la 73a IJK (en gufujo), en Madagaskaro, en la unua kongreso de afrikaj esperantistaj virinoj EVAA, kaj en la afrika kongreso de Esperanto en Burundo. Mi partoprenis plurfoje en talentmezura konkurso de lokaj muzikistoj, nome "Sana weekend".

AM: *Ĉu vi povas paroli al ni pri via filma projekto?*

JM: Esperanto, kiel ĉiuj aliaj lingvoj, devas esti uzata por diversaj celoj. Mi rimarkis, ke Esperantaj filmoj estas tre raraj en Esperantujo. **Ĉar** filmo estas efika ilo por pruvi la ekziston kaj utilecon de lingvo, mi konceptis projekton „Filmoj en Esperanto" en 2019. Kaj ni, Rondo Esperantista de Kiwanja,

kunlabore kun Cinéclub La patience, sukcesis aperigi nian unuan filmon, *Kvazaŭ korpo sen koro*, septembre de 2021. Ĉi tiu filmo montras la suferojn, kiujn la kongolandanoj spertas nuntempe.

Jen la ligiloj al ĝi:
Kvazaŭ korpo sen koro 1: https://youtu.be/fOgcD8eFXIE,
Kvazaŭ korpo sen koro 2: https://youtu.be/qv0WUYENO2s).
Ni tutkore dankas ĉiujn, kiuj morale kaj finance subtenis nin, aparte s-ron Kiah Morante de Miriado kaj Ulrich Matthias.

Ni estas je la komenco de nia projekto, ni bezonas **Ĉies kunlaboron!**

AM: *Kiel ĝi povus helpi en la instruado de Esperanto?*

JM: Filmo kreita en iu ajn lingvo propagandas ĝin, same kiel muziko – foje oni interesiĝas pri fremda lingvo spektante filmon en tiu lingvo aŭ aŭskultante kanton en tiu lingvo. Mi forte kredas, ke neesperantistaj filmamantoj, aŭ amatoroj de filmoj sendube estos allogitaj al Esperanto per niaj diverstemaj Esperantaj filmoj. Ankaŭ novbakitaj esperantistoj estos kuraĝigitaj de niaj filmoj, preterdube! Ni esperas produkti pli da instruaj filmoj en la venontaj jaroj.

AM: *Ĉu estas similaj klopodoj en Afriko, pri kiuj vi scias?*

JM: Sendube jes. Ni ne estas la unuaj por fari filmo(j)n en Esperanto. En Burundo, ekzemple, estas teamo de aktoroj, kiuj jam publikigis sian filmon *La Heredaĵo*, reĝisoritan de s-ro Dankon Kwibe.

AM: Mi dankas al vi, Joel Muhire

El la landoj kaj sekcioj…

Ĉinio

Finiĝis E-kurso ĉe la Universitato de Nanchang la 6-an de januaro 2022. Dudek du studentoj el 14 fakoj de la universitato trapasis la finan ekzamenon. La kurso havas 32 horojn, ĉiuĵaŭde posttagmeze po 2 lernohoroj. Tiuj, kiuj sukcese trapasis la ekzamenon, ricevos 2 kreditpoentojn. La E-kurso elektita ĉe la Universitato malfermiĝis en 2004, kvankam ne ĉiujare ĝi funkciis, sed dum la lastaj 6 jaroj, la ofteco malfermi la E-kurson multiĝas pli ol antaŭe, ĉiujare eĉ ĉiusemestre ekde 2020 funkcias la E-kurso, kaj Esperanto allogis pli kaj pli da intereso de studentoj. La Universitata E-Asocio por studentoj

ĵus festis sian dek-jariĝon kaj ricevis laŭdon de la rilata administra institucio. Ankaŭ la instruistino GONG Xiaofeng (Arko) gajnis la premion por Elstara Instrukvalito pro la E-kurso.



Esperanto ne nur estas lingvo. Por riĉigi la instruadon de Esperanto kaj aktivigi la etoson de lernado, la 16-an de decembro 2021, ĵaŭde, okazis speciala celebra aktivado en la klasĉambro. La studentoj festis la Zamenhof-tagon per deklamado de tri poemoj de Zamenhof: *Ho, mia kor'!, La Espero* kaj *La vojo.* Antaŭ ĉio, Arko koncize prezentis pri Zamenhof-tago kaj diverslandaj festaj aranĝoj kaj vidigis mallongan filmon pri Zamenhof. Fine ŝi voĉlegis parton de la libro *Hodler en Mostar* de Spomenka ŠTIMEC, proponitan de ILEI por simbola tutmonda legado.

Post tio estis tempo deklami poemojn. Kvar studentinoj voĉlegis la poemon *Ho, mia kor'*!, sekvis dekopa grupo, kiu voĉlegis la poemon *La Espero* kaj ok studentoj deklamis la poemon *La vojo*. Ĉiuj studentoj estas tre diligentaj, kvankam ili malkaŝis, ke ili neniam estis sur la scenejo, nek kantis, dancis, nek deklamadis, krom 4 studentoj el la fako muziko. Post la kuraĝigo de Arko, la studentoj akceptis la taskon kaj preparis tion antaŭ 2 semajnoj. Ili dividis la voĉlegotajn poemojn en alineojn, kaj desegnis la legomanieron. La celebra aktivado estis sukcesa, ne aperis balbutado, studentoj flue voĉlegis ĉiun strofon.

Finiĝis la E-kurso ĉi-semestre, venis bona informo el la instrua platformo, la 27-an de decembro 2021, entute 60 novaj studentoj elektis la E-kurson de la venonta semestro, kiu malfermiĝis fine de februaro.

GONG Xiaofeng (Arko)

Germanio

Sekcia raporto + alvoko por somera kursaro

AGEI, la germana landa sekcio de ILEI daŭre aktivas. Kompreneble pro la pandemio ankaŭ nia asocio havis kaj havas malfacilaĵojn: mankas ĉeestaj renkontoj kaj klerigseminarioj, eĉ la jarĉefkunvenojn ni devis organizi en hibrida formo, do parte per interreto (Zoom). Sed nia membraro restas regule informita per la AGEI-cirkulero kaj per la propra interna retlisto.

En julio 2021 en la Esperanto-Centro Herzberg tamen povis okazi la kutima dusemajna somera lingvokursaro, kaj en oktobro la Tradicia Oktobra Renkontiĝo PEDagogia (TORPEDo 16) kun prelegoj kaj interŝanĝo de spertoj. Ĝi estis organizita de la Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo kaj AGEI denove en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Ĝi fariĝis internacia, ja ĝi gastigis la partoprenantojn de la eŭropa Erasmus+-projekto kun partneroj el Francio, Pollando, Britio kaj Nederlando. Ĝi traktis pri la sekvaj ĉeftemoj: Eŭropa Volontula Servo, internacia volontulado, trejnado de volontuloj kaj preparo al la akcepto kaj lingva helpo, evoluigo de iliaj kapabloj.

Novembro 2021 restos memorinda: reprezentantoj de la Interkultura Centro Herzberg, Peter ZILVAR kaj Zsófia KÓRÓDY ricevis inviton prezenti Esperanton al la kunveno de ĉiuj lernejestroj en la granddistrikto Göttingen. Ĝi okazis per Zoom al du grupoj kaj daŭris ambaŭ fojojn ĉ. 20 minutojn. La motivo estis la kreskanta interesiĝo pri alternativa lingvoinstruado kaj ebla enkonduko de Esperanto en la lernejan proponaron.

Kursoj kaj klerigcelaj kunvenoj okazadas pli-malpli regule en pluraj federaciaj landoj, ĉefe aktivas gekolegoj ekzemple en Hamburg, Frankfurt, Stuttgart, Münster, Berlin, Hameln, Neubrandenburg kaj en la Altlernejo Emden. Okazis popolaltlerneja (VHS) kurso en Frankfurt am Main, kaj ankaŭ funkciis virtuala kurso kun uzo de la bone ellaborita lernmaterialo fare de d-ro Rudolf FISCHER: Esperanto en dialogo: *https://agei.esperanto-urbo.de/netzkurs/*.

Ni povas raporti ankaŭ pri la kresko de la pedagogia, metodika fakkolektaĵo en la biblioteko de la Interkultura Centro Herzberg. Ĝi estas je dispono por

ĉiuj interesiĝantoj, partoprenantoj de la klerigseminarioj, metodikaj kursoj kaj verkantoj de faklaboraĵoj.



ALVOKO: en somero 2022 denove okazos Somera Esperanto-Perfektigo (SEP) en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo:
1. semajno: 29.07-05.08.2022 – intensaj lingvokursoj en diversaj niveloj (A2-B2)
2. semajno: 06.08-13.08.2022 – intensaj lingvokursoj en diversaj niveloj (A2-B2) kaj perfektiga kurso por instruemuloj, metodika instrukapabliga trejnado (C1-C2).
Ĉiutage 6 instruhoroj, posttagmeze ekskursoj, vespere muziko, filmoj, kulturaj programoj, rostadfesto ktp.
Malmultekosta restado, komuna manĝado, eĉ tendumado eblas.
Kurskotizoj: 1 semajno 120,00 €, 14 tagoj 195,00 €. Rabatitaj prezoj: ekz. por studentoj. Bv. demandi nin pri eblaj stipendioj.
Kontakto: zsofia.korody@esperanto.de aŭ esperanto-zentrum@web.de


Hungario

La dua virtuala asembleo de ILEI-HU

La 12-an de marto 2022 membroj de EPME (Hungara Asocio de Esperantistaj Instruistoj, t.e. la jure agnoskita ILEI-HU) havis sian duan virtualan asembleon. La ĉefa tagordero estis: la pridiskuto de la financa kaj agada raporto pri la jaro 2021.
La oficiala bilanco estas poste publike alirebla ĉe la ŝtataj instancoj kaj ĝin ni aperigas ankaŭ ĉe *https://www.ilei.info/hungario/index.php*.
Pro la pandemio ni ne povis fizike kunveni. Ni havas 39 membrojn en 2022, en la asembleo partoprenis 18 kolegoj + 2 gastoj. (Laŭ la statuto, estas eblo kunvenigi duan asembleon, samtage, kie por havi kvorumon ni ne bezonas 50%-ojn). La asembleo akceptis la raporton de la estraro kaj ĝi aperis publike. Por la kunveno ni uzis Zoom, kun teknika helpo de Katalin Kováts (edukado.net).
Dum la kunveno ni aŭskultis prelegon de Pálma Salomon-Csiszár pri la taksado de skribkapablo en lingvoekzamenoj de la Origo-ekzamencentro.
Kelkaj eroj el la raporto pri la jaro 2021:

- en marto 2021 ni havis nian unuan virtualan asembleon (vd. IPR 2021/2.),
- pluraj membroj partoprenis en la Virtuala E-Kongreso de ILEI en 2021,
- per malfacila batalo ni atingis, ke oni daŭre rajtu trapasi abiturientan ekzamenon pri Esperanto (malfeliĉe, ni ne trovis mezlernejon, kie

almenaŭ unu kolego havus unusolan lernanton pri Esperanto, kaj sen tiu antaŭkondiĉo la ekzameno tamen ne povas funkcii),
- Kováts Katalin, Kovács Márta, Kóródy Zsófia, Salomonné Csiszár Pálma okupiĝis pri la ellaboro de la C2-a nivelo de la UEA-KER-ekzameno,



- Stefan MacGill, Felszeghy Judit, Molnár Mónika kaj József Németh partoprenis en la redaktado de *Juna Amiko*, *IPR* kaj la hejmpaĝo de ILEI,
- Felszeghy Judit redaktas la retejon https://uea.facila.org/filmetoj/, kie ŝi proponas facilajn kaj malpli facilajn filmetojn por komencantoj kaj komencintoj,
- ni funkciigas du korespondajn listojn (kun 70+34 membroj), Fejsbuk-grupon (kun 65 membroj) kaj József Eszényi kreis nian Fejsbuk-paĝon, kiun momente sekvas 66 kolegoj.

Jozefo NÉMETH

Italio

Bona kunlaboro inter la itala sekcio de ILEI kaj la Itala Instituto de Esperanto

Prezidantino de la itala sekcio: Luigia Oberrauch Madella
Membroj dum la jaro 2021: 29.
Ricevis la revuon IPR sur papero 18 kaj rete 11 membroj.
Nun ni havas ankaŭ membron, kiu ne aperas en la oficiala listo de la itala ILEI-sekcio. Niaj du ILEI-komitatanoj estas s-ro Ermanno Tarracchini el Modeno kaj s-ino Filomena Canzano el Ciampino (Romo).

Bedaŭrinde ni ne havas oficialan hejmpaĝon kaj ĉiuj mesaĝoj de la centra oficejo de ILEI estas plusendataj al niaj membroj pere de mia retadreso esperoenparmo2020@yahoo.com. La ILEI-membrokotizo daŭre restas 25,00 eŭroj.

Nia sekcio kunvenis fizike dum la Itala Esperanto-Kongreso en Assisi la 23-an de aŭgusto 2021. La sekva kunveno okazos, ĉiam kadre de la nacia E-kongreso, en Brescia la 22-an de aŭgusto 2022. La elektoj de la itala ILEI-sekcio okazos en 2024.

Ni partoprenas en la komuna projekto de ILEI kaj de la Itala Instituto de Esperanto, kiu nomiĝas „30 oraj horoj" por superaj lernejoj en Toskanio. Ĝi validas ankaŭ por la aliaj 29 italaj regionoj. Tiu ĉi instruado jam komenciĝis kaj pluraj geinstruistoj eklernas Esperanton pere de la konsiloj de la projekto.

ILEI kunlaboras en reta instruado de la lingvo organizita de samideano Gianantonio Pfleger kun la helpo de la manlibro *Corso intensivo di Esperanto per allievi e autodidatti* de Pedro Aguilar Solà. Post 15 hora instruado la lernantoj estas invitataj submeti sin al oficiala ekzameno de I.I.E. Kvankam la pandemio ankoraŭ minacas, ni plulernadis pere de enretaj kursoj organizitaj de profesoro Pedro Augilar Solà, kiu nelacigeble instruadas la lingvon.

Esperanton oni instruis pere de movadaj kursoj en Parma (Luigia Oberrauch kaj Alessandra Madella), en Romo (Giorgio Denti), en Genovo (Patrick Morando), en Torino (Pedro Aguilar Solà), en Milano (Francesco Fagnani), en Trento (Norma Covelli), en Trieste (Elda Doerfler), en Alta Garda (Gianantonio Pfleger), en Bolonjo (Romano Bolognesi kaj Ivan Orsini), en Pisa (Brunetto Casini), en Grosseto (Laura Brazzabeni), en Pescara – Chieti (Pino Lalli) kaj en Verdello – Bergamo (Maria Galizzi).

En la ĵus pasinta jaro 2021 lernis la internacian lingvon pere de KIREK (KomputIl-Reta Esperanto-Kurso) 29 homoj. Aliaj komencis lerni ĝin pere de la kurso KAPE.

Ni varbas pere de la broŝureto *ILEI-Esperanto ed educazione* en la itala kaj en Esperanto. Subvencion ni sukcesis havigi al ni pere de la projekto VERDEN, kies motoroj estas IFEF (fervojistoj) kaj BEMI (biciklistoj). VERDEN – Comenius+ estas administrata de UEA kaj ricevas monhelpon pere de EU. La projekto antaŭvidas 6 fizikajn renkontiĝojn kaj la unua kunveno okazis ĝuste en Parmo la 21-an, 22-an kaj 23-an de novembro 2021.

Mi finas mian raporton dirante ke ni estas atendantaj monatojn, dum kiuj oni povos denove fizike kunveni kaj agadi sen la timo malsaniĝi pro la terura Covim-19 kaj ĝiaj multaj tre insidaj variantoj.

Luigia OBERRAUCH MADELLA, estrino de la itala sekcio de ILEI

Festa kunveno honore al samideano Giovanni Cupri la 8-an de apr. 2022
Post diligenta studo de Esperanto pere de KIREK, la Komputil-Reta Esperanto-Kurso de Itala Esperanto-Federacio, sinjoro Giovanni (Esperante: Johano) Cupri ricevis la KIREK-atestilon el la manoj de la pastro Gustavo Zanoli, la prezidanto de la Esperanto-klubo G. Canuto de Parmo (Italio). Deziris kunfesti tiun ĉi agrablan momenton la gesamideanoj, kiujn vi povas vidi sur la foto sube.



De maldekstre: Angelo Bruno, la pastro Gustavo Zanoli, Luigia Oberrauch Madella, Giovanni Cupri, Alberta Mellone, Angela Bergonzi kaj Carla Zanacca.

Sinjoro Johano skribis en sia prijuĝo de la kurso: „Estis tre pozitiva sperto studi per KIREK, ĉar pere de ĝi mi akiris novajn konojn kaj konatiĝis kun homoj kaj valoroj de tiu ĉi medio. Mi deziras uzadi la lingvon skribe kaj parole. Bedaŭrinde ŝajnas al mi, ke ni samideanoj estas alkroĉiĝantaj al boateto de granda revo en ŝtorma maro."
Sed intertempe ni ĝuu kune la amikecon kaj la pacemajn pensojn, kiuj regas en niaj Esperantaj rondoj.

Luigia OBERRAUCH MADELLA, estrino de la itala sekcio de ILEI

Kroatio

Raporto de la ILEI-sekcio, Kroatio

Prezidantino: Marija Jerković. Membroj: 6 + 6 kunlaborantoj

Agado: La sekcio okupiĝas pri E-kursoj, kiuj nun ne bone funkcias pro la pandemio. Ni havas unu lernanton sed planas en aprilo organizi kurson per ZOOM por gejunuloj.

Ni organizas prelegojn pri la famaj esperantistoj el Kroatio. Niaj membroj partoprenas en la projekto de Erasmus+ pri la reta edukado kaj ili, Pleadin, Seleš kaj Maglica, vizitis Bjalistokon, Toulouse kaj ĝia grupo vizitis Kroation, kie ili trarigardis la Dokumentan Esperanto-Centron en Đurđevac (DEC), kies gvidanto estas Josip Pleadin, membro de ILEI Kroatio. DEC eldonas E-librojn kaj lastatempe eldonis dulingvajn librojn: *Poezia triptiko* (poemoj de Lidija Leskur, Luca Cetinić kaj Jadranka Tarle Bojović en traduko de Josip Pleadin, Marija Jerković kaj Darija Budiša) kaj la libron *Magia ludo* de du esperantistinoj Daria Budiša kaj Luca Cetinić.

Ni kunlaboras kun la societoj el Split, el Gorica Monda Paco, el Bjelovar (BEA). Split, la naskiĝurbo de Ivo Lapenna, festis 100 jarojn de Esperanto en ĝi, kaj ni partoprenis. Nun DEC preparas monografion: *100 jaroj de Esperanto en Split.* Mi preparis du ekspoziciojn en Zagreb, en du diversaj urbaj bibliotekoj, titolitaj: Esperanto, la lingvo de amikeco.

Ĉiuseptembre BEA organizas kunvenon de ĉiuj esperantistoj el Kroatio, invitas ankaŭ amikojn el niaj najbaraj landoj, al kunveno titolita: Esperantistoj al sia urbo. Lastfoje dediĉita al la bjelovara Esperanta poeto Željko Sabol. Ni legis la poemojn de Sabol en la kroata kaj en Esperanto. Samtempe estis prezentita la libro de Sabol en Esperanto.

Marija JERKOVIĆ

Kroataj esperantistoj en la Kroata Parlamento akceptita en la Fako pri eŭropaj aferoj

S-ro Domagoj Hajduković, prezidanto de la Oficejo por eŭropaj aferoj ĉe la Kroata parlamento, akceptis la 3-an de februaro 2022 delegacion de Kroata Esperanto-Ligo por informiĝi pri la kroata kontribuo al la Konferenco pri la estonteco de EU. La delegacio konsistis el Spomenka Štimec, prezidantino de Kroata Esperanto-Ligo, Maja Tišljar, konsilantino de Eŭropa Esperanto-Unio kaj gvidantino de la projekto „Akcelilo por multlingveco", kaj Đivo Pulitika, prezidanto de Kroata Esperanto-Junulara Asocio. Kiel membro de la delegacio partoprenis ankaŭ Szabolcs István, prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio.

S-ro Hajduković kun granda intereso aŭskultis la proponon de la irlanda diplomato Seán Ò Riain al la Konferenco pri la estonteco de EU. La propono traktas la bezonon pligrandigi la instruadon de fremdaj lingvoj en EU. Li tre interesiĝis pri la ilaro, al kiu atentigas Ò Riáin, la ilaro, kiu povus gvidi al pligrandigo de multlingveco en EU, „Akcelilo por multlingveco". Štimec klarigis, ke temas pri la kroata projekto, kiun ekde 1979 ĝis sia morto en 2020 gvidis la kroata esperantisto Zlatko Tišljar el Velika Gorica. Kadre de tiu projekto estas publikigitaj multaj lernolibroj de Esperanto en 34 lingvoj dise tra la mondo. Baze de la „Akcelilo" estas la propedeutiko: lernantoj en la unuaj lecionoj lernas la bazon de la parolata Esperanto por ricevi ideojn pri tio kiel lingvoj funkcias.

S-ro Hajduković proponis sian helpon pri informado pri la propono kaj la projekto en la kroata parlamento. Li donis plurajn utilajn konsilojn, kiel Kroata Esperanto-Ligo informu ĵurnalistojn kaj lernejdirektorojn pri la projekto. Se esperantistoj akceptas, li mem trovos manieron paroli antaŭ parlamentanoj pri la temo.

S-ro Szabolcs gratulis al s-ro Hajduković, ĉar Kroatio protektis la tradicion de Esperanto kiel nematerian kulturan heredaĵon de Kroatio. „Tio estas vera leciono ankaŭ por ni, hungaroj. Ĉe ni ĉ. 60-70% de la loĝantoj ne parolas fremdan lingvon kaj Esperanto povus grave mildigi la situacion, kontribuante al komunikado. Mi miras, ke Kroatio ne pli profitas de tio, kion ĝi protektis. Ekz. ĉu ne Zagrebo devus esti la monda ĉefurbo de Esperanto? Tio fariĝas des pli interesa, kiam Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo planas vendi la domon, kie ĝi havas sian sidejon…"

S-ro Hajduković petis pli da materialoj pri la temo.

Spomenka ŠTIMEC

Luksemburgo



Forpasis Claude Nourmont (1945-2022)

Claude Nourmont naskiĝis en la franca urbo Rouen la 23-an de oktobro 1945 kaj mortis la 25-an de februaro 2022. Ŝi estis Dumviva Membro de UEA, konstanta Membro de Societo Zamenhof, Honora Prezidanto de TEJO kaj Komitatano de UEA.

Ŝi esperantistiĝis en 1963. Ekde tiam ŝi aktivis movade, vizitis Esperanto-renkontiĝojn, organizis kaj laboregis por Esperanto. Inter 1975 kaj 1977 ŝi estis prezidanto de TEJO. En 1973 ŝi fariĝis

ĝenerala sekretario de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE; nun Espéranto-France); inter 1994 ĝis 2001 ŝi estis prezidanto de UFE. Ŝi prezidis la Lokan Kongresan Komitaton de Montpellier (UK 1998).
Ŝi estis Komitatano de UEA ekde 1986 ĝis 2022 kaj Vicprezidanto de UEA inter 2004 ĝis 2013. Ŝi estis redaktoro de *Monato* (rubriko Arto, 2005-2022), ĉefredaktoro de *Le Monde de l'Espéranto* (2003-2022) kaj konstanta prizorganto de Kleriga Lundo dum la UK.
Ĉiame ŝi restos en nia memoro, kiel tre bonkora persono kun eterna emo kontribui, helpi, animi, pacigi kaj financi. Ŝi estis granda mecenato de Esperanto-agadoj. Kiam aliaj fermis la orelojn, ŝi ofte estis la unua, kiu donacis. Nome de la tutmonda komunumo ni prezentas nian kondolencon al la familio kaj al la multaj geamikoj de Claude tra la mondo.
Ĉiuj estas bonvenaj kondolenci en la Panteono de Edukado.net: https://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=246

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 1024

En tre diversaj Esperanto-eventoj, kiujn okazigis virtuale la Irana Esperanto-Asocio (IrEA), iam kun variaj universitatoj de Irano, Claude Nourmont partoprenis kontribuante per siaj instigaj komentoj kaj demandoj. La lasta fojo estis dum la „2-a Ret(sem)inario pri Turismo kaj Esperanto" en la Universitato de Tehrano, kies ekran-foton vi vidas ĉi tie.



Ahmad MAMDUHI
IPR 22/2➢25

Rusio

Mi estas Aleksandr Blinov kaj mi loĝas en la urbo Ĉeboksaro (Ŝupaŝkaro), kiu estas la ĉefurbo de la Ĉuvaŝa Respubliko (Rusio). Mi kunhavas privatan lingvan lernejon kaj tie instruas la italan, la francan, la ĉuvaŝan kaj foje Esperanton. Aldone oni min invitas prelegi en la loka Pedagogia Universitato ĉe la fakultato de fremdaj lingvoj. Tie mi de tempo al tempo proponas senpagajn kursojn de Esperanto por la studentoj de la fakultato. En tiu ĉi lernojaro mi invitis ankaŭ studentojn de alia Universitato (t.n. Ĝenerala Universitato) kaj aliĝis pli ol 30 personoj. Ni faris lecionojn kaj ĉeestajn kaj distancajn (Zoom-ajn). La kurseton finis 9 personoj. Fine de januaro mi ekhavis la ideon lanĉi senpagan 10-lecionan kurson pere de Zoom por ĉiuj universitatoj de Rusio (por la fakultatoj de fremdaj lingvoj).

Mia universitato helpis min pri tio. La informo ekflugis la 4-an de februaro kaj por tiu ĉi horo jam aliĝis 36 personoj el la plej diversaj universitatoj de la lando. La aliĝperiodo finiĝis la 20-an de februaro. Por kungvidi la kurson mi petis miajn amikojn Daria Zelenina, Andrej Grigorjevskij kaj Vjaĉeslav Ivanov (ili ĉiuj estas bonaj instruistoj kaj parolas plurajn lingvojn). Fakte krom tio mi petis diskonigi la informon tra Studentaj komitatoj de la Universitato, por ke la informo eventuale atingu aliajn fakultatojn (ĉefe filologiajn). Mia celo estas "kapti" studentojn kaj eventuale instruistojn, kiuj volas lerni la lingvon kaj kiuj estas lingvemaj. Tiuj studentoj kutime rapide lernas Esperanton kaj, se ili estas estontaj lingvoinstruistoj, ili estas rapide kapablaj instrui la lingvon. Somere en aŭgusto mi volas organizi renkontiĝon por tiuj homoj en mia regiono. Mi havas tre bonajn kontaktojn en someraj lokoj kaj relative favorajn prezojn.

Do mi petas kaj proponas kunlaboron al ĉiu, kiu ŝatus kunlabori.

1. Por miaj Zoom-kursoj mi invitas gastojn (kiuj prefere estu alilandanoj kaj devas en la baza nivelo paroli kun la studentoj)
2. Mi ŝatus havi volontulojn, kiuj povus veni al mia somera aranĝo (invitilon por Rusio mi faras de mia lernejo kaj pretas kovri restadkostojn kondiĉe ke la homo instruu kaj aktive partoprenu en la programo)
3. Mi estas preta inviti volontulon, kiu instruu Esperanton kaj laŭeble faru klubojn k.s. de fremdaj lingvoj (angla, franca, germana, ĉina, korea, japana...) por 3-monata restado en mia urbo (mi provizos per loĝejo kaj poŝmono kaj certe faros la inviton).

Ps. Por pli validigi la retan kurson estus tre bone havi iujn atestilojn pri la 10-hora retkurso de iu internacia instanco kaj se UEA aŭ ILEJ aŭ eĉ TEJO povus havigi al mi tiajn atestilojn, mi estus vere dankega!

Aleksandr BLINOV, al.blinov@gmail.com

Ripeti por enkapigi

de Rob MOERBEEK (Nederlando)

Ŝajnas superflue memorigi pri la diversaj tipoj de lingvostumbloj („eraroj”), kiujn eĉ ni esperantistoj en nia relative simpla lingvo kapablas prezenti al la mondo. Niaj vortaroj kaj eĉ la indeksoj de normaj gramatikoj impresas fidinde solide, sed estas ankaŭ impone longaj, nedigesteblaj. Tamen io devas okazi. Prefere agi ol rezigni. Eble ni respektu la meritojn kaj tradiciojn de la Zamenhofa lingvo, kiu kiel internacia lingvo restu plejeble unueca. Kaj certe ni instruantoj provu ĝisdatigi niajn sciojn.

Lastatempe Petro Desmet reeldonis la nepran *Fundamento de Esperanto* kun la vortaro de KABE. Kompreneble parte nemoderna: troviĝas pluraj arkaismoj, el kiuj li signas kelkajn.

El mia korekto-kolekto, ĉefe sed ne ekskluzive de la duonjaro ekde julio 2021 nur por la revuo *Esperanto*, jen kelkaj el la doloraj amuzpunktoj.

1. SPACO: Ĉu vor-tdivido gravas? Tamen vi tuj korektus Sudo-rienta Azio.
2. KURSIVO: La revuo Esperanto. (Titoloj de libroj, gazetoj)
3. VORTORDO: Kelkaj maljunuloj ankaŭ aperas. Tion mi ne diris, sed vi. Li ne estas videbla ankoraŭ (la predikato magnete altiras adverbojn, tro-nacilingve.) La tri unuaj ricevas premion. Vidi la vizaĝon de unu alia. En septembro 11. Ĉiuj ni en tuta nia grupo lernigetu!
4. INTERPUNKCIO: Okazis diskuto pri la financa situacio kaj koncertoj, ktp. Venis s-ro P, la urbestro kaj lia edzino. (Kiom estas indikitaj?). Kiu scias kiuj venos kaj povas kontribui? Ĉi-tiu Esperanto kongreso. Humboldt Universitato. 50.000; 6a.
5. LITEROJ: Swahila. Tagmese. Tio estas nature. Mi estas bone. Departamento. Prenu akvamelonon. Ĉeha arĥitekto.
5a. USKLADO: instruisto de Mezlernejo. La komitato.
6. -N: (AL-direkto, senprepozicia objekto aŭ adjekto): Kiun oni omaĝas? Mi vizitis tri klubojn: la klubo L de R…. La premio sumas 600 EUR libere uzeblaj en la Libroservo. La Kongreso havos tradiciajn erojn kiel la Someran Universitaton. Ili eliris la domon. En ĵaŭdo la 22-an de decembro. La sekretario petas al ili transdoni rimarkojn.
7. -J: Lingvoekonomio kontraŭ naciismoj: Ili riskis siajn vivojn. Ni jam nun estas planata por gufujo.
7a. VERBOFORMOJ: Ĉu eblis ke mi estis malsana? Estis bele, ke jam ĉiuj ĉeestas. Helpu, ke ni venos akurate. Se vi venos, ni eble venkus. Post legigi

al ili tekstojn, mi diskutigis prie. Ekzistas raportoj de ĉeestantoj en antaŭaj kunvenoj. Kolektiĝis gvidantoj en la konferenco, okazinta en Glasgovo. La temoj traktitaj kovris plurajn fakojn. La registraĵoj povas esti modifitaj forpreninte la fuŝajn partojn.
7b. IGI/IĜI: Sen mildigo, vualigo aŭ kompato. La programo interesigas junulojn. Engaĝiga maniero instrui. Ni bezonas restrukturiĝon de la asocio. Ĉu ni finiĝis?
8. LA (=tiu, nia, jam menciita/konata): En havenurbo K. De 13-a jarcento. La kongreso havas tradiciajn erojn sed ankaŭ la diferencajn. Aŭspiciata de la Universala Esperanto-Asocio.
9. PRONOMOJ: Fontoj kies plejmulto troviĝas en privata posedo. Adaptiĝu al la virtuala mondo por utiligi ties avantaĝojn. La asocio servu ties membrojn. Ili donis mian identigilon. Infanoj por kiuj ni aranĝas kotizojn kaj ni ankaŭ instruas al ili Esperanton.
10. PREPOZICIOJ: Temas pri kiel alfronti la klimatŝanĝiĝon. Kompare al la pratempo, ni vivas komforte. Ni ne havas malpli membrojn. Premio da mil eŭroj. Kio nin eĉ pli da malĝoje trafas, ke landa asocio perdas la orientiĝon. Urbo norde de nia lando. Elekti kiun de la programeroj sekvi. Flanke de la estraro. Ŝtonoj kolektitaj far esperantistoj. Bazita je la temo de la disertacio. Efiko je la maniero. Fokuso je naciaj esperantistoj. Oni pagas po persono nur 185 eurojn. La manifestacio iris trans la stratoj.
11. AFIKSOJ: Aspektoj valorindaj. Ĉu tio havas plivalorecon?
12. KORELATIVOJ: tie kaj alie. Ne tuŝu alies rajtojn.
13. VORTFARADO: kunmetado: vd vortordo. La 25-a jubileo. Distraj programoj. La enloĝantoj. Enkadre de. Flanke de.
14. SUBJEKTO: Mi foriris, ĉar komprenis ke urĝas. Ni helpos, kiam komprenos la instrukciojn.
15. KONJUNKCIOJ/SUBJUNKCIOJ: Ambaŭ mi kaj miaj gefratoj. Kvankam li urĝis sin, sed la tempo pasis pli rapide. Venu se vi estos preta.
16. NACIISMOJ kaj aliaj devioj: (parte dualingvaj anglismoj): Premio adekvata al Oskar-premio; grupo kiun mi konis dum ekskurso. Lia konferenco temis pri personaj spertoj. Esperanton li lernis de la parencoj. Post kaftrinko sekvis vizio de la apuda oficejo. Sekve ni reveturis. Kiu ebligis vin tiel ĝeni? Ni ekzercu lingvojn. Ni ofertas senpagan kurson. Necesas sin konduti kaj kontroli. Enspezoj korespondu kun laboro.
17. PERSONA NOMO: Ahmad diris…
18. STILO: Nia lando prosperas kaj ankaŭ najbaraj landoj. Ankaŭ la naturo printempas.

19. SENINTENCA ŜERCO: Estas multe pli amuze paropreni en la reta evento. La aŭtobuso kondukis nin tra ĉarmaj vilaĝoj, belegaj pejzaĝoj kaj akvofaloj.

KOREKTOJ

1. Ĉu vortdivido gravas? Tamen vi tuj korektus: Sud-orienta Azio.
2. La revuo *Esperanto*.
3. Aperas ankaŭ kelkaj maljunuloj. Tion diris ne mi, sed vi. Li ankoraŭ ne estas videbla. La unuaj tri ricevas premion. Vidi la vizaĝon unu de (la) alia. En la 11-a de septembro (11 septembro). Ni ĉiuj en nia tuta grupo lernetigu.
4. Okazis diskuto pri la financa situacio, kaj koncerto ktp (ne diskuto pri koncerto). Venis s-ro P., la urbestro, kaj lia edzino (se duope). Kiu scias(,) kiuj venos, kaj povas kontribui (mem)? Ĉi tiu (nepre sen streketo) Esperanto-kongreso. La Humboldt-Universitato. 50 000; 6-a.
5. La svahila (laŭ Nino Vessella: sŭahila kun supersigno). Tagmeze. Tio estas natura (Estas nature.). Mi fartas bone. (Al mi estas bone.) Departemento. Prenu akvomelonon. Ĉeĥa arkitekto.
5a. Instruisto de mezlernejo. La Komitato.
6. Al kiu oni omaĝas? Mi vizitis tri klubojn: la klubon L. de R…. La premio sumas 600 EUR, libere uzeblajn en la Libroservo. La kongreso havas tradiciajn erojn kiel la Somera Universitato (kiel= ekzemple, ne „estiel"). Ili iris el la domo (forlasis la domon). En ĵaŭdo la dudek-dua de decembro. La sekretario petis ilin transdoni (al li) rimark(ig)ojn.
7. Ili riskis sian vivon. Ni jam nun estas planantaj gufujon (Pluralo de modesteco= pluralo.)
7a. Ĉu eblis ke mi estas malsana? (ne validas la rekta parolo ĉe „okaz(ig)i"). Estis bele (=okazis, ankaŭ ĉe „taksa opinio"), ke jam ĉiuj ĉeestis. Helpu ke ni venu akurate. Se vi venos, ni eble venkos. Post tio (aŭ: Post ol) legigi… Ekzistas raportoj de ĉeestintoj… Kolektiĝis gvidantoj (gvidontoj) en la konferenco, kiu okazis (tiam) en Glasgovo. La temoj traktataj (ne post trakto) kovris plurajn fakojn.
La registraĵoj povas esti modifitaj post forpreno de la fuŝaj partoj. Aŭ: Oni povas modifi la registraĵojn forprenante…
7b. Sen vualado. La programo interesas junulojn. Engaĝ(ant)a maniero instrui (partopreniga maniero). Rekonstruadon de la asocio. Ĉu finiĝis nia programo/ Ĉu ni finis?
8. En la havenurbo K. De la 13-a jarcento. La kongreso havis … ankaŭ diferencajn (aliajn, nekutimajn) erojn. (ne jam detalitajn, do nekonatajn: sen LA). Aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio.

9. Fontoj, el kiuj plejmulto… al la virtuala mondo, por utiligi ĝiajn avantaĝojn. Nia asocio servu siajn membrojn (al siaj membroj). Oni donis mian identigilon. Infanoj por kiuj ni aranĝas kotizon kaj al kiuj ni ankaŭ instruas Esperanton.
10. Temas pri tio kiel alfronti/ pri la maniero alfronti… Kompare kun la pratempo… Ni ne havas malpliajn (malpli multajn) membrojn (malpli da membroj). Premio de mil eŭroj. Eĉ pli malĝojigas nin, ke … Urbo norde en la lando. Elekti kiun el la programeroj sekvi. Fare (deflanke) de la estraro… Kolektitaj de esperantistoj. Bazita sur… Efiko sur la maniero… Fokuso sur naciaj esperantistoj. (JE estu uzata nur se ne ekzistas ĝustasenca prepozicio.) Oni pagas nur po 185 eŭrojn (por persono). La manifestacio iris tra la stratoj.
11. Aspektoj aprezindaj (valoraj). Ĉu tio havas pli(an)valoron?
12. Tie kaj aliloke. Ne tuŝu aliulajn rajtojn/ la rajtojn de aliaj.
13. La 25-jara jubileo. Distraj programeroj. La loĝantoj. Kadre de. Fare de (deflanke de: flanke de signifas i.a. „apud")
14. Mi foriris, ĉar mi komprenis… Ni helpos, kiam (fine)(aŭ: se) ni komprenos la instrukciojn.
15. Kaj mi kaj miaj gefratoj. Kvankam li urĝis sin, tamen („sed" estas uzebla nur en egalnivelaj propozicioj, ne ĉefpropozicie post kvankam). Venu, kiam…
16. Egalvalora (ekvivalenta) al (kun, kiel) la Oskar-premio. Grupo, kiun mi ekkonis… Lia prelego temis pri… Esperanton li lernis de la gepatroj. Sekvis vizito (trarigardado?) de la oficejo. Poste (sekvis, ke ni… „Sekve" normale signifas „Tial", do ne plaĉis la oficejo.) Kiu ebligis al vi tiel ĝeni? (persono ne „eblas", nur ago: „vin" fariĝus objekto de ĝeni.) Ni ekzercu nin pri lingvoj (eblas ekzerci, trejni nur personon). Ni proponas senpagan kurson (oferti nur por komerci). Necesas bone konduti kaj sin regi. Enspezoj repondu al laboro.
17. „En oficialaj rilatoj" implicas iom formalan aliron de tekstoj. S-ro Ahmad Mamduhi.
18. Krome la naturo… (utilas variigi la stilon: ekzemple, ne sepfoje sinsekve uzi „okaz-")
19. Partopreni. … kaj preter akvofaloj (la zeŭgmo efikas ridige: bona fino.)

Pri „Hodler en Mostar”[2]

(intervjuo de Alessandra Madella kun Spomenka Štimec)

Spomenka Štimec estas elstara Esperant-lingva verkistino el Kroatio. Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) proponis simbolan tutmondan legadon de ŝia libro *Hodler en Mostar* (2006) por celebri la Tagon de la Esperanto-Libro (ali-nome: Zamenhofan Tagon) en 2021.



SŠ: Spomenka Štimec

AM: Alessandra Madella

AM: ILEI proponis vian libron *Hodler en Mostar* (2006) por la Tago de la Esperanto-Libro 2021. Kion vi povas diri al ni pri ĝi?

SŠ: Oni diras, ke Esperanto ne havas kulturon. Malĝuste! Nia kulturo estas impona. Nia tegmenta asocio UEA naskiĝis en 1908 en tre kultura loko. La ideo pri ĝi ĝermis en la hejmo kaj ateliero de tre fama svisa pentristo, Ferdinand Hodler. Lia filo Hector estis la kunfondinto de nia tegmenta asocio. Kiam mi aŭdas, ke ni estas senkulturuloj, mi respondas: Mi ne dirus tion. Ni eĉ heredis la pentriston Ferdinand Hodler pere de Hector. Testamente Hector lasis sian heredaĵon duone al sia edzino Emilie, kun kiu li edziĝis en 1917, unu jaron antaŭ la morto, kaj al sia ido Universala Esperanto-Asocio. Malrekte, per Hector, ni ricevis la monon kiu apartenis al Ferdinand.

AM: Kiel vi havis la ideon verki la romanon?

SŠ: Mi ĉiam volis spekti la pentraĵojn de Hodler en Svislando. Kaj iutage mi legis en ĵurnalo, ke Hodler gastas en Zagrebo! Mi iris al la ekspoziciejo kaj komprenis, ke tio ne estas Ferdinand Hodler el Svislando sed el Sarajevo! Mi komprenis, ke miaj najbaroj en Bosnio havas mirindan rakonton pri la

[2] Fonto: Ĉina Radio Internacia (2022-01-04), *http://esperanto.cri.cn/recomended2/3842/20220104/726255.html*

patro de Hector Hodler en sia galerio. Kaj mi opinias, ke la esperantistaro meritas koni tion plian, kion ni havas.



AM: Kiel vi esploradis por la romano?

SŠ: Mi staris en tiu zagreba ekspoziciejo kaj gapis al la pentraĵo nomata „Tajloristino" aŭ „Augustine" kaj komprenis, ke mi vidas la unuan „portreton" de Hector Hodler, ĉar tiu tajloristino estis graveda. Mi kontrolis en kiu jaro ĝi estis desegnita: en 1887, kiam naskiĝis Hector. Mi komprenis, ke mi devas aĉeti ĉiujn eldonaĵojn pri Hodler el Sarajevo kaj Ljubljana (kie la ekspozicio iam gastis), por kolekti informojn. Krome, kiam mankis informoj, mi enŝaltis mian fantazion.

AM: Kiun lokon havas tiu libro en via verkaro?

SŠ: Gravan. Dankon ke vi metis ĝin kiel legaĵon por la Zamenhofa Tago 2021!

AM: Kial vi decidis verki tiun ĉi libron kaj la plejmulton de viaj libroj rekte en Esperanto?



SŠ: La kroata lingvo havas multajn verkistojn. La Esperanta ne tiom. Mi helpu al tiu, kiu estas malpli forta. Kaj kiun mi multe amas. Mi ŝatas ankaŭ la kroatan, kompreneble. Mi verkis ankaŭ en ĝi.

AM: Ĉu vi verkis aliajn librojn, kiuj iel priparolas la historian fonon de Esperanto?

SŠ: Jes. *Ombro sur interna pejzaĝo* estas romano pri Esperantaj amoj kaj disiĝoj.

AM: Kiuj el viaj libroj estis tradukitaj al aliaj lingvoj ĝis nun? Ĉu estas ĉinaj tradukoj?

SŠ: *Kroata milita noktolibro* havas 8 eldonojn en tiom da lingvoj. *Ombro sur interna pejzaĝo* estas italigita el la esperanta eldono. *Tilla* aperis en la japana kaj korea.

Ĉinigitaj kaj publikigita ĉe la Universitato de Harbin estas miaj vojaĝ-impresoj el Japanio, *Nesenditaj leteroj el Japanio*. Oni informis min, ke tiu verketo estis helpliteraturo por ĉinaj studentoj, kiuj studis la japanan.

Ĉina esperantistino, Harpina, en 2021 publikigis en Interna Mongolio mian instruilon laŭ la Zagreba metodo *Esperanto ne estas nur lingvo*.



Krome. mi inspiriĝis pri la japana ĵurnalistino Hasegawa Teru, kiu edziniĝis al ĉina esperantisto, fuĝis kaŝe el Japanio al Ĉinio, alvenis… (komprenis ke li jam havas edzinon tie), komprenis ke la japana armeo invadas Ĉinion, ricevis ordonon reveni hejmen kun aliaj japaninoj… sed ŝi decidis resti kaj lukti kontraŭ la japana armeo. Mi verkis teatraĵon por la pekina UK *Virino kiu flustris en uragano*. Tre interese estis, ke la afiŝo de tiu teatraĵo ricevis la premion „Cent plej belaj afiŝoj de la mondo" kaj estis ekspoziciita en Parizo ĉe UNESKO en 1987.

AM: Via verko estas ankaŭ prezentita ekster Esperantujo en la germanlingva libro *Die Bienen und das Unsichtbare* (La abeloj kaj la nevideblo, 2020) de la aŭstra verkisto Clemens Johann Setz...

SŠ: Clemens Johann Setz estas tre estiminda nuntempa aŭstra verkisto. Kvankam li ne estas esperantisto, li decidis dediĉi sian romanon al la fenomeno de planlingvoj. Li lernis Volapukon por kompreni, kio ĝi estas. Li lernis Esperanton. Li komprenis, ke tiu Esperanto havas indan literaturon, kaj sur cento da paĝoj li priskribis kio estas la Esperanta literaturo, por la nesciaj germanaj legantoj. Tiu lia libro ricevis la plej prestiĝan germanan premion en julio 2021 „Georg-Buechner-Preis". Li verkis pri Vasilij Eroŝenko, la rakonto pri li gvidas tra la tuta historio de la Esperanta literaturo sur cento da paĝoj. Kaj ene de ĝi sur deko da paĝoj li analizas mian kontribuon al la Esperanta literaturo, kun admiro, kiel li subskribis. La libro devus baldaŭ aperi ĉe Mondial en Esperanto.

***

Noto de IPR: vi povas spekti filmeton de Mirejo Grosjean pri tiu temo kun titolo *Mirejo pri "Hodler en Mostar"* ĉe *https://youtu.be/g7rPHvygR8k*.

LA 55-a ILEI-KONGRESO:
de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2022

KONGRESA TEMO:

Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado

En 2022 la Kongreso okazos denove ankaŭ en ĉeesta medio en la belega Universitato Laval, en Kebekurbo, de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2022: temas pri la 55-a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kies ĉeftemo estas: „*Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado*”. Ĉar la Kongreso okazas en oficiale du-, sed fakte plurlingva lando, la ĉeftemo certe vekos la intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de profesiuloj pri instruado de alilandaj lingvoj, universitataj esploristoj kaj profesoroj, ĵurnalistoj kaj la ĝenerala publiko, kiuj sindediĉas al tiu temo, ĉu profesie, ĉu ne.



Ni atendas vian aliĝon kaj viajn kontribuojn por la kongresa temo, prelegoj, lingva festivalo, internacia vespero ktp. En la aliĝilo vi povas mencii viajn kontribuojn kaj anonci ilin al ilei.kongresoj@gmail.com.

La limdato por sendo de la proponoj estas la **31-a de majo 2022, por ke ili estu enmetitaj en la provizoran programon**. Por ĉiu kontribuaĵo bonvolu sciigi al ni:

- la titolon de la prelego
- la nomon de la preleganto
- la daŭron de la prelego
- ĉu vi prezentos ĉeeste aŭ rete
- 2-linian priskribon de la kontribuaĵo
- 2-linian biografieton de la kontribuanto

Kiel kutime, vi povos ankaŭ ĝui ekskursojn, lingvan festivalon, indiĝenajn spektaklojn ktp.

La aliĝilo troveblas en 2022.kongreso.org.

La mendilo de loĝado kaj ekskursoj estos en la sama supre menciita ttt-paĝo.

Laura BRAZZABENI, ILEI-estrarano pri kongresoj

Alvoko al ILEI-Simpozio (Kebekurbo, 04-05 aŭg. 2022)

ILEI-kongresa simpozio: „Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado".

En la espereble unua postpandemia jaro de la nuna jardeko okazos en Kebekurbo, de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2022, la 55-a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kies ĉeftemo estos: „*Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado*". Celante altiri tiujn, kies dialogo kun tiu kongresa temo estas pli profunda, ILEI rezervos la du lastajn labortagojn de sia kongreso por okazigo de ties jam tradicia ILEI-Simpozio. Ĝi okazos la 4-an kaj 5-an de aŭgusto 2022 kaj estos malferma por (ne)esperantistaj fakuloj kaj interesatoj, ebligante ilian debaton pri temoj de komuna intereso, observataj el diversaj vidpunktoj. La laborlingvoj estos laŭvice Esperanto, la franca kaj la angla.
Celante diversaspektan traktadon de la simpozia ĉeftemo, oni komprenas ke ĝi inkluzivas, sed ne limiĝas al la jenaj subtemoj:

- Didaktikoj por instruado de lingvo al diverslingva lernantaro
- Uzado de interretaj teknologioj por instruado de Esperanto
- Esperanto en la kultura mozaiko de Kebekio kaj de Kanado
- Uzado de Esperanto por interŝanĝo de kulturaj valoroj

- Pedagogiaj valoroj de Esperanto-kulturo
- Kontaktoj inter kulturoj: harmonio kaj pliriĉiĝo
- Tradukado kiel didaktika ilo por instruado de lingvoj
- Interkultura lernado kaj edukado per Esperanto
- Kulturaj temoj kaj instrumaterialoj en lingvolernado
- Specifaĵoj kaj postuloj de plurlingva edukado
- Lingvaj rajtoj kaj edukado
- Interkultura komunikado en plurlingvaj edukmedioj
- Indiĝenaj kaj minoritataj lingvoj en edukado

Se vi deziras prelegi pri tiu ĉi temaro aŭ pri io alia koncernanta la kongresan temon, ni tre kore invitas vin sinanonci per sendo de retmesaĝoj al ilei.kongresoj@gmail.com, kopie al magisterpita@gmail.com. Post via sinanonco, bv. sendi vian prelegproponon al la supre menciitaj retpoŝt-adresoj. La limdato por sendo de la prelegpropono estas la **31-a de majo 2022.**

Bonvole en via propono enestu:

- ***Via prelegtitolo***
- ***Via plena nomo kaj via institucio*** (ILEI, AIS, Universitato de… aŭ simile)
- ***Resumo*****:** bonvolu uzi inter 100 kaj 200 vortojn.
- ***Ŝlosilvortoj*****:** (3-5 ŝlosilvortoj) elektu la vortojn/esprimojn, kiuj plej trafe indikas al leganto kiujn fakojn kaj faktojn via prelego pritraktos.
- ***Aŭtoro*****:** por prezenti vin kiel aŭtoron bonvolu uzi maksimume 150 vortojn. Via preskvalita foto estu aldonita en aparta dosiero.

Viaj prelegoj devas esti originalaj, ne publikigitaj nek planataj por publikigo aliloke. Surbaze de viaj kontribuoj ni redaktos provizoran programon, kiun ni sendos al vi, kaj vi estos petataj sendi kompletan tekston de via prelego ĝis la **30-a de septembro 2022.** Viaj prelegresumoj estos publikigitaj en la *Kongresa Libro* kaj plenaj prelegtekstoj en *Simpoziaj Aktoj*. Por via prelego vi disponos pri 20 minutoj, kun 10 minutoj por diskuto. La preleglingvo estos Esperanto, la franca aŭ angla (ĉi-okaze kun paralela prezento en Esperanto). Ĉiuj aliĝintoj de la kongreso aŭtomate rajtas partopreni en la simpozio sen apartaj aliĝilo kaj kotizo. Tiuj, kiuj volas aliĝi *nur* al la simpozio, kiel preleganto kaj/aŭ aŭskultanto, povas uzi la saman kongresan aliĝilon (baldaŭ diskonigota) kaj pagi la nur-simpozian kotizon.

Bonvenon!

Fernando PITA
(je la nomo de la organiza komitato)

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Simon Smits (*la dua membro elektota*).
Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny, Mireille Grosjean.
Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*
Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*
ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*
IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*
TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**
UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**
LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. Nedeljka Ložajić, *nedeljkalozajic@gmail.com*.
kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.
FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*
UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**
Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.
kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj (laŭ la malnova UEA-difino), **12,50 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 12,50 € por la A-landoj, 6,25 € por la B-landoj kaj 1 € por la C-landoj**. **Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €.** Abono de JA papera kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA reta kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, <*ilei.kasisto@ gmail.com*>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, *www.ilei.info/ipr/;* tel*: (+36-70) 931-0530.*
Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.
**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aprilo 2022,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aŭgusto 2022.**



Kelkaj REK-anoj (vd. la intervjuon kun Joel Muhire sur p. 14)



Esperantistoj en la Kroata Parlamento (vd. p. 25, foto: Hrvatski sabor)


MI PAROLAS
ESPERANTE

